

Universala Kongreso 29a julio - 5a aŭgusto Florenco, Italio

Andrew Weir raportas pri sia unua internacia Esperanto-evento, la Universala Kongreso de 2006 en Italio



S@luto!
 AŬTUNO
 2006

Ĉi-aŭguste mi iris al Florenco por ĉeesti mian unuan Universalan Kongreson de Esperanto. Ĝi estis mia unua eksterbrita Esperanto-aranĝo, kaj ĝi estis neforgesebla sperto.

Mi alvenis en Florenco iom timetante. Mi ne sciis kion atendi de Universalan Kongreson. Ĉu Esperanto vere

funkcias, ne nur por konversacii inter samlingvanoj sed ankaŭ alilandanoj? Ĉu mi kapablos paroli sufiĉe rapide kaj kompreni tion kion ili diros al mi? Ĉu mi naĝos aŭ dronos?


Ĉiuj timoj forvaporis preskaŭ tuj post kiam mi registris min ĉe la kongresejo. Frapis min la amikeca etoso kiun kreis la bablado kaj feliĉo de ĉiuj kongresanoj – kaj frapis min ankaŭ la facileco de komunikado inter homoj. Por la unua fojo mi spertis la senton ke nia facila lingvo ne estas nur ludilo sed vera ilo por komuniki.

La kongresa temo estis "Lingvoj, kulturoj kaj edukado al daŭrigebla evoluo". La programo estis bunta kaj interesa. Inter prelegoj, kunvenoj, koncertoj, teatraĵoj kaj literaturaĵoj ne eblis enuiĝi. Mi aparte ĝuis la prelegon pri "Kiel paroli publike", farita de Humphrey Tonkin, kaj la teatraĵojn de Paul Gubbins prezentita per la "Verda Rano".

Krom la formalaj eventoj, kompreneble gravas la neformalaj konversacioj kaj amikecoj kiujn oni faras ĉe Universalan Kongreson. Sed eĉ per Esperanto eblas kulturaj miskomprenoj. Mi notis ke rimarkoj pri mia skoteco estis kutima metodo

komenci konversaciojn kun mi; mi parolis kun juna Belgino pri Skotlando, kaj mi diris ke mi intencis kunporti mian kilton al Florenco, sed ĉar ĝi estas peza kaj la temperaturo estis ĉirkaŭ kvardek gradoj, mi feliĉas ke mi efektive decidis ne kunporti ĝin. Ŝi tiam diris al mi ke ankaŭ ŝi posedas kilton kaj ofte portas ĝin en Belgio! Miaj protestoj ke virina kilto ne estas fakte kilto, sed jupo, estis ignoritaj...

Florenco mem estas belega kaj historioplana urbo (kvankam iomete varmas en aŭgusto por




skotulo!). Eĉ sen la UK, facile oni povus pasigi ok tagojn vagante tra Florenco kaj ne vidi dekonon da tio, kion ĝi havas por vidi. La junularo organizis noktan promenon tra Florenco (kiun fakte ĉeestis multege da homoj, junuloj aŭ ne – ni ja estis stranga grupo, kaj multaj Florencanoj admiris nian Esperanto-flagon!), kiu ebligis al ni vidi vidindaĵojn kiel la Uffizi, la Duomo, la Ponte Vecchio, (kopion de) la statuo de

Davido, kaj simile.



Redakta noto

Welcome to the second edition of **S@luton!**, the newsletter of JEB. For this issue, I'll be guest-editing, before handing over the reins to my good friend **Daniel White**. This is the *bilingual* version, that we post out to our patrons as a thank-you for their kindness to us.



us have likely heard off. She tells her story on page 6.

Estis aparte bone ke mi pagis malmulte por iri al Florenco – mi profitis de subvencio de NoJEF (Noriĉa Jubilea Esperanto-Fondaĵo), kaj mi rekomendas al ĉiu juna Esperantisto en Britio profiti de tiu ebleco de subvencio. Mi treege ĝuis mian unuan Universalan Kongreson. Mi nun atendas senpacience Jokohamon en 2007!

Andrew Weir

If you're new to the language, why not give the Esperanto version a look-over too; you'll definitely find it easier to understand if you use the English edition to help you. *Both the monolingual versions (Esperanto and English) are available online, at www.novajeb.org.uk and www.jeb.org.uk/forumoj.* I'll happily provide direct links to them should anybody ask me to.

So what do you have to look forward to in this edition? Quite a variety, as it

happens, a number of which involves trips abroad.

Andrew Weir attended his first international Esperanto event when he spent a week in Italy for the Universala Kongreso. The week after, **Daniel White** was in Sarajevo for the youth version. Both write about their experiences in this issue.


Along similar lines, **Clare Hunter** popped along to the Swiss canton of Graubünden, where she came face-to-face with a language that few of

JEB's long-time treasurer, **Michael Seaton**, graces us with a quick interview, bringing up subjects as diverse as Stephen Fry, middle names, and Dimitri Shostakovic.

Finally, you'll come across a couple of articles that I wrote. One is a laid-back snapshot of the different JEB members' favourite words, the other introduces the newly opened JEB online forums.

I hope that you will all enjoy this little offering. Comments, criticisms, and offers of articles are always welcome. Mail us at saluton@novajeb.org.uk and please pass by the forums to say hello.

Happy reading~!

TIM 

Internacia Junulara Kongreso August 6th–13th 2006

Daniel White took part in the International Youth Congress and sends us this report from Sarajevo, Bosnia-Herzegovina

Having arrived a little late on Sunday, I found that the congress had already

started. Almost immediately I was greeted by several people. Because I was going to be



travelling on my own to Bosnia and I wouldn't have known a lot of participants, before I set

With some beers inside us, we thought that it would be a good idea to set off for the city centre, but we didn't have a clue where we were. So after a bit of circling about some good-looking bright-spark, can't remember exactly who, suggested that we all stop stroking the mangy cat, unlose ourselves and go back to the bar in the congress-hall.

other; the bridge where the assassination of Archduke Ferdinand happened, which kicked off the First World War; and the National Library of Bosnia-Herzegovina, which was burned along with 2 million irreplaceable books and documents by Serbian soldiers in 1992 during the war. What's more, we successfully found an Irish bar for a bit of a break and in a Bosnian eatery tried the local dish *Burek*.

The big excursions included a trip to the Old Bridge of Mostar, which is rather ancient ... or at least was ancient before the Croats destroyed it for being a symbol of Bosnian culture and independence during the war. In 2006 the bridge was rebuilt using the original stones, so the one that we saw was the *new* Old Bridge. I heard that they are planning to build an even *older* bridge in the future.

The next morning it was clear just

out, using *lenu.net*, I got to know and communicated with three other young people for whom this year's IJK would also be their first big get-together; Esben from Denmark, Sophia from Germany, and Álvaro from Spain. In addition, I had already been at another international event in France, so there were one or two faces that I recognised and, of course, Rolf Fantom kept appearing from time to time. So with those that I already knew, my roommate Oscar from the Netherlands, and friends of friends, I found myself in a very international group. Before long we found the shop and noticed just how unbelievably cheap the drinks were, so not to throw away the opportunity, we soon got in to the swing of things.

how right the decision was not to walk to the centre; the journey to Sarajevo itself took half an hour by tram! The old parts of the town were especially nice, but the whole city seemed as modern as any other big city in Europe. The area has played an unforgettable role in the history of the 20th century and for a long time has been known for its ethnic and religious diversity. Because of this mixture, Sarajevo sometimes has the nickname 'European Jerusalem'.

There we visited the main Islamic, Catholic, Orthodox, and Jewish places of worship, which are in close proximity to each

Some of our group decided to



take part in the additional trip to the newly discovered Bosnian

person might think that the local inhabitants were only trying to

a very funny one from Croatia.



'fill their boots' with the money of tourists, but, obviously, I wouldn't say that.

During the week it was really good to be able to become friends and have fun with people who truly have the same ideas from so many countries; but, in fact, from where everyone came wasn't most important because Esperanto really pulls down national barriers and makes it possible for you to see all people as equals.

For the evenings an 'alright' varied program was



Daniel White

Pyramids; how you actually hide a pyramid wasn't made completely clear. I have to say that from a distance these 'pyramids' looked a lot like hills and when we got nearer they were still very hill-looking but, thankfully, from nowhere appeared a load of souvenir T-shirt and hamburger sellers to inform us that they were, in fact, pyramids. With the sight of the various Pyramid Hotels and Guest-houses, an untrusting

organised which demonstrated well the range of cultural activities which are accessible through Esperanto. Several nights, famous Esperantist musicians performed, like JoMo, Esperanto Desperado, and, my favourite, Dolchamar. There was also a show of Bosnian dancing.

On Friday in the community centre we saw two good theatre plays, one serious and the other

Renkontu Michael Seaton

Kasisto de JEB



Ĉu vi havas mesaĝon por la JEBanoj?

Saluton! Kiel vi? 😊

Kiel vi Esperantistiĝis? Antaŭ 12 jaroj (dum mi estis 13-jaraĝa) mi eltrovis en la libro "Free Stuff for Kids" artikolon pri senpaga lernado de lingvo. Mi skribis leteron al la adreso, kiu estis por EAB, kaj mi eklaboris la Senpagan Poŝtkurson de Esperanto. Dum mi faris ĝin, mi ekentuziasmiĝis pri la lingvo kaj ĝiaj utiloj por helpi internacian

komunikadon. Mi kredas forte pri tutvivlernado de ĉiuj fakoj – aparte lingvoj – do mi daŭras lerni (kaj paroli) Esperanton.

Kion vi faras kiel Kasisto? Ĉefe mi prizorgas la monon de JEB ... Mi organizas la banko-konton kaj helpas decidi, ĉu proponataj projektoj estas finance

eblaj. Membreco de JEB nun estas senkosta, do ni nur ricevas donacojn de donacemaj "plenkreskuloj" kaj informojn pri fondusoj kiel ekzemple NoJEF por niaj membroj.

Ĉu vi ofte ĉeestas Esperantajn eventojn?

Ne tiom ofte kiom mi volas – mi ne havas multe da libera tempo. Tamen, mi preskaŭ ĉiam iras al Britaj Kongresoj kaj, ĉar mia panjo loĝas proksime al Stoke-on-Trent, mi ofte vizitas Esperanto-Domon en Barlaston por katalogi la Bibliotekon Butler kaj kelkfoje estas tie dum iuj Esperantaj eventoj (ekzemple, Ni Festivalu!, la Somera Festivalo). Mi ja intencas ĉeesti eventon ekster Britio, sed ĝis nun mi havis nek la monon nek la tempon fari tion ... espereble tio ŝanĝiĝos post kiam mi estos trovinta laboron!

Kio estas via favorata Esperanta vorto?

Palpo – kiel *gripe* en la angla, tiu vorto havas multajn signifojn, kaj sugestajn kaj naivajn! Dusencaĵoj tre plaĉas al mi, ĉar ili ebligas pli ol unu nivelon por konversacio ... utilas, se oni deziras kaŝi sencon for de pli granda aŭdienco!

Kio estas via profesio?

Nuntempe mi estas doktoriĝa studento pri kemia inĝenierado ĉe la Universitato de Manĉestro, kun apartaj specialaĵoj pri mezurila tekniko kaj komputada modelado de fluidoj. Post unu jaro, mi esperas doktoriĝi per mia skribota tezo kaj poste trovi laboron kiel inĝeniero – kaj eskapi universitaton!

Kion interesinda aŭ distranta vi povus diri pri vi?

Errr ... mi malamas piedpilkon, mi estas gejo, roza vino plaĉas al mi, mi havas longan langon, mia meza nomo estas Andrew (laŭ la komponista kuzo de mia panjo), mi naskiĝis je unu minuto antaŭ la meznokto (23:59), kaj mi estas la sola Esperanto-parolanto en mia familio.

Ĉu vi havas hobiajn?

Kelkajn – krom Esperanton, kompreneble! Mi tre ofte muzikumas en kelkaj amatoraj orkestroj kaj teatraĵoj per mia

aldviolono kaj por pruvludoj de teatraĵaj grupoj per piano. Mi estas granda amanto de klasika muziko, aparte de la komponistoj Bach, Beethoven, Brahms, Britten, kaj Ŝostakoviĉ. Mi ankaŭ ŝatas societumi kun amikoj ... mi serĉas ĝisvivfinan koramikon, sed espereble mi ĝuas la serĉadon por li!

Ĉu vi parolas aliajn lingvojn?

Krom Esperanton kaj la anglan, mi ankaŭ parolas la germanan pli bone ol plej multaj britoj! Mi havis pli grandan entuziasmon por lingvoj dum mi estis pli juna, kaj mi provis lerni la francan kaj la kimran – la unuan pli sukcese ol la duan. Mi ankaŭ komprenas iom de la itala por muzikumado, sed mi ja bezonis frazlibreton kiam mi vojaĝis Italion antaŭ du jaroj!

Do. Endas, ke vi translokiĝu al isola insulo. Neniun najbaron vi havos. Kiujn kvin aferojn vi volus forpreni kun vi?

Se eblus, mi forprenus (1) pianon por distri min kaj helpi plenumi miajn avidajn urĝojn, (2) kurtondan radion por aŭskulti distrajn programojn (espereble en Esperanto), (3) ion per kio mi eblus skribi libron, (4) mian koramikon (kiu ajn li estus) por provizi al mi ĝisvivfinan amantan kompanion, kaj (5) la vortaron *Teach Yourself Esperanto Dictionary* por skribi notojn, kiujn mi metus en botelojn!

Kio estas via hero(in)o, ĉu morta, ĉu vivanta?

Mia morta heroo estis la rusa komponisto Dmitri Ŝostakoviĉ – li rifuzis kompromisigi siajn artajn normojn eĉ kontraŭ granda premo de sia registaro kaj ankoraŭ komponis eble la plej grandajn muzikverkojn de la 20a jarcento.

Se vi kapablus vojaĝi transtempen, kiu estus la unua persono aŭ evento kiun vi volus renkonti/vidi?

Mi volus renkonti la aŭtoron Douglas Adams, por demandi lin, ĉu li vere aĉetis la unuan Makintoŝ-komputilon en Britio? (Eblas, ke aŭ li aŭ Stephen Fry aĉetis ĝin, sed neniun estas certa pri tio!)

La kaŝita lingvo de la kantono

de Clare Hunter

Starante en la stacidomo de Klosters, oni troviĝas en la mezo de tradicia Germana-parolanta Svislando. La fama feria urbo kuŝas en belega valo, ĉirkaŭata de la neĝkovrataj Alpoj. La tieuloj parolas unu al la alia uzante unikan lokan dialekton de la Germana – strangan parolmanieron kiun eĉ la Germanoj mem ne facile komprenas. Klosters estas vivanta versio de la tipa bildpoŝtkarta Svislando.

El Klosters oni povas vojaĝi trajne tra la Vereinan tunelon, kiu trairas tra la vastan mason de kelkaj montoj kaj en la najbaran Malsupran Engadinan valon. Kiam la trajno finfine aperas, palpebrumante, en la Engadinan sunbrilon, novulo en ĉi tiu regiono bezonas kelkajn minutojn por konscii ke tiu estas portita en malsaman mondon. Tiom bela kiom sur la alia flanko de la monto restas la kamparo, kiam la trajno malrapidiĝas kaj haltas ekster la unua eta vilaĝo, sed iel *io* ŝanĝiĝis.

Estas anonco de la lokomotivestro. La vojaĝantoj ĉirkaŭrigardas konfuzite. *Kion li ĵus diris?* Supozeble, ke la trajno haltas ĉi tie,

sed liaj vortoj ne apartenas al iuj ajn bone konataj lingvoj. Ĉu li uzis ian nekutiman Germanan dialekton? Ŝajnas ke ne, ĉar li parolis per preskaŭ Itala akĉento. Ĉu do eblas, ke li fakte parolis la Italian? Tion kredi estus facile.

Tamen estus ankaŭ grava eraro, ĉar la viro fakte parolis tute alian lingvon; la Romanĉan. La Romanĉa estas unu el la tri tiel-nomataj Retia-Latinidaj lingvoj, kiuj evoluis el la Vulgara Latina kiu estas parolita en Mezeŭropo dum la Romia Imperio regnis. Kiam ĝi estas skribata, la lingvo ofte aspektas kiel stranga kunfandiĝo de la Germana kaj la Itala. Oni fakte ofte ŝercas, ke la Romanĉa similas al la Itala kiun prononcas ebria Germano. Hodiaŭ ĝi estas la kvara oficiala lingvo de Svislando, parolata de proksimume 110.000 homoj en la Svisa kantono de Grizono. Tia oficiala agnosko estas granda sukceso por tia eta lingvo. Ja estas pli da homoj en la mondo kiuj parolas *Esperanton* ol kiuj parolas la Romanĉan!

Fakte priskribi la Romanĉan kiel *unu* lingvo estas iomete malpreciza ĉar la lingvo verdire konsistas el almenaŭ kvar diversaj dialektoj: la Sursilvana, la Sutsilvana, la Sumirana, kaj fine la Ladina, kiu mem konsistas el du dialektoj. Ĉi tiuj estas parolataj en la Engadina valo. Grizono estas tre monta kantono, kaj eĉ nuntempe ne

estas facile vojaĝi de vilaĝo al vilaĝo, speciale dum la longaj neĝaj vintroj. Antaŭ ol la fervojo estis konstruita, komunikado estis eĉ pli malfacila, kaj pro tio tiom da dialektoj kreskis. Kvankam parolantoj de unu dialekto povas sufiĉe bone kompreni parolantojn de aliaj, multaj Romanĉaj vortoj tute malsimilas, dependante de en kiu valo vi troviĝas. Ekzemple, la vorto "taso" povas esti *scadiola*, *scariola*, *cuppegn*, *coppa* aŭ *cuppina*.

Estas tial manko de kunigo en la Romanĉa-parolantaj regionoj. Por solvi ĉi tiun problemon, lerta lingvisto kiu nomiĝas Heinrich Schmid 1982 decidis *normigi* la Romanĉan. Li efektive kreis novan lingvon, kiun li nomis "Rumantsch Grischun" kaj intencis, ke Romanĉa-parolantaj Svisoj ĝin uzi por babili al parolantoj de aliaj dialektoj. La ideo tamen ne estis populara kun la normalaj homoj kaj nuntempe ĝi ekzistas ĉefe kiel skribata lingvo. La Svisa registraro, ekzemple, uzas Rumantsch Grischun por sia oficiala Romanĉa korespondado.

Multaj homoj zorgas pri la konservado de la lingvo kaj timas, ke ĝi mortos pro la kreskanta migrado de la loka popolo en la pli riĉajn Germana-parolantajn urbojn de la kantono. Pro tio, oni entuziasmeme eldonas Romanĉajn librojn kaj ĵurnalojn, kreas Romanĉlingvaj radiostaciojn, kaj instruas la infanojn per ĝi en la lernejoj. Turistoj kiuj jam flue parolas la Germanan eĉ havas la eblecon ĉeesti specialajn kursojn kiuj temas pri la historio kaj gramatiko de la Romanĉa lingvo. Tamen, por vidi ke la Romanĉa ja ankoraŭ estas vivanta, necesas nur promeni tra la Engadinon.

Se oni forlasas la trajnon ĉe la unua haltejo, oni povas piediri sur vojeto laŭlonge de la flanko de la montoj. Post horo oni atingas Guarda, belega vilaĝeto kiu sidas danĝere sur la rando de roka kornico. Sur la blanka gipso de la etaj malnovaj domoj, kiuj borderas la mallarĝan ĉefstraton, estas pentritaj multaj belaj bildoj. Kelkaj montras farbajn birdojn kaj bestojn, aliaj montras detale rakontojn el la Biblio aŭ la loka historio. Sub ĝi

mallongaj Romanĉaj frazoj estas gravuritaj; ĉu poemoj, ĉu preĝoj ne scieblas. En la vojoj kuras nudpiedaj Romanĉa-parolantaj infanoj, dum siaj sunbrulitaj patrinaj staras en la ĉefplaco, lavante siajn vestaĵojn en la akvofontanoj kaj babilante rapide en nekomprenbla lingvo. "Allegra", ili diras amikeme al la pasantaj turistoj.

Ŝajnas nekredeble ke oni povas vojaĝi 20 kilometrojn tra tunelon, kaj alveni en moderna Germana urbo. Ŝajnas nekredeble, ke oni fakte troviĝas en unu el la plej riĉaj landoj de la mondo, lando de bankoj kaj financo. Oni sentas kvazaŭ oni envenis pasintan jarcenton. La Malsupra Engadino vere estas rimarkinda ejo; valo forgesita de la tempo kaj kun sia propra sekreta lingvo. Vizitindas! Jen kelkaj esprimoj, kiujn vi plejeble aŭdos tie:

Allegra! - Saluton!

Co vai? - Kiel vi fartas?

Bun di - Bonan matenon

Buna saira - Bonan vesperon

Buna notg - Bonan nokton

Jau hai num... - Mi nomiĝas...

Co avais vus num? - Kiel vi nomiĝas?

A revair! - Ĝis la revido!

Parolas la Romanĉan 110.000 homoj. Tio signifas, ke la Romanĉa troviĝas en la 10% de plej parolataj lingvoj. (El la 6.809 'vivantaj' lingvoj, 90% estas parolataj de malpli ol 100.000 homoj.)

Clare Hunter



Online forums (or 'message boards') are places where people get-together to swap ideas, hints 'n' tips, and chat and discuss popular current affairs.

JEB successfully set up its own forums a few months ago. They feature content that should prove useful to all Esperantists in Britain, both beginners and long-time activists.

Examples include illustrated methods of how to install free software that allows the user to easily insert Esperanto's accented letters.

Now, instead of having to choose between compromises such as "gxangalo", "ghangalo", "g^angalo", "g'angalo", "g^gangalo", and so forth, you'll be able to find out how to type in "ĝangalo" ... and this only takes two minutes to set up!

Plie, ni recenzas diversajn lerno-rimedojn, ekzemple (ret-)vortarojn kaj senpagajn

The screenshot shows the JEB forums homepage. At the top, there's a navigation bar with links for Membroj, Serĉi, Helpi, Detaloj & Preferoj, and Hejmo. Below that, there's a secondary navigation bar with icons for Private Messaging, Members, Search, Help, Settings, Logout, Home, and Admin Control Panel. A welcome message for user 'Tim' is displayed, along with links for Today's Messages, Unread Messages, Unanswered Messages, Show Polls, and Message Navigator. The main content area features a table of forum topics under the 'Generala' category.

Forum	Messages	Topics	Last message
Generala			
Useful Help (Helposoj) Bits & pieces that you may find of use (Aĵoj & umoj uzinda)	26	6	Fri, 17 November 2006 By: Tim
Learning Materials Various means of learning Esperanto	58	10	Thu, 14 December 2006 By: Tim
Questions (Demandoj) Have a question about Esperanto? Ask it here. (Ĉu demandon pri Esperanto vi havas? Demandu ĉi-tie)	262	21	Thu, 30 November 2006 By: Tim
Common Errors (Oftaj Eraroj) How to avoid common pitfalls (Kiel eviti kutimajn enfalulojn)	31	8	Fri, 01 December 2006 By: Tim

Behold the first screenshot that greets you when you visit the forums. It's worth noting that the most popular subforum (262 posts) is clearly the one that deals with Esperanto-based questions. It seems that the forums have already assisted both learners and long-time Esperantists alike improve and concretise their knowledge of and ability in the international language.

korrespondo-kursojn, kaj ligi al ili, por faciligi al la leganto trovi tiujn helpaĵojn.

We also review different types of learning materials, such as (online) dictionaries and free correspondence courses. We link to them, so that interested readers can easily track them down.

The most popular section of the forums is where Esperanto-based questions are asked and answered. Up for perusal at the moment we have answers on the uses of different suffixes, questions on transitivity, and various ways of translating the multiple uses of the English *should*.

As a helper, you'll find an entire sub-forum dedicated to pointing out common pitfalls into which one can stumble. How do we know this? Because we've made the same mistakes ourselves. (Read into it what you like about me having started some 90%+ of those threads!)

Other sub-forums exist so that members of the local groups can chat away in group discussions, plan their activities for future meetings, and so forth.

After you've been around for a while (or whenever you ask), the chat threads will be opened to you, in which the more social topics come up for discussion. Current themes involve open debate on whether it's moral to kill a man (Saddam Hussein) because he already killed others, the meaning of Christmas to different people, and a few jokey threads in honour of Jebanoj's birthdays.

Most of the content is in English (although forum headings are in both languages). This is entirely my decision and I realise that some people will see it as a negative. My approach is very straightforward; what better way could there be to make new people feeling comfortable than by making sure that the content is accessible to the most beginner-level passer-by? The people who are most likely to benefit from the language-related tips and hints are those who have not yet mastered Esperanto. Answering a grammar question in Esperanto rather than the mother tongue of the asker and readers makes little practical sense in my eyes.

Of course, there are times when we spin off into Esperanto, and that is to be applauded when it happens. Nonetheless, JEB is an open organisation and – with that in mind – the 'ne krokodilu' rule which spoils so many Esperanto environments is completely cast aside.

So, please pass by and have a look. I have no issues regarding age and nationality; if you wish to join, I would be most pleased to see you in the forums. The content will be of use to everybody, and I would love to receive contributions from those much older and wiser than I. Certainly, the voice of experience is a voice worth listening to ... the fact that I'm getting near to the age limit for JEB having nothing to do with my admission of this, of course! 😊

www.jeb.org.uk/forumoj



The following people represented British Esperanto at the London Language Show:
Gavan Fantom, Tim Owen, Tom Shorney, Hannah Tellier, and Daniel White



Homoj ĉiam havas siajn preferatajn vortojn en vivantaj lingvoj. Sed ĉu tio ankaŭ veras por hom-farita lingvo? **Tim Owen** iras serĉi la veron ...

Se iam mi provus krei lingvon, mi volus, ke ĝi estu, ni diru, "Esperanteska". Neŝanĝanta gramatiko, esceptoj malĉeestante, logiko kaj fleksebleco egale okazante. Kaj ... alian aferon ankaŭ mi volus; ke ĝi kapablu krei favoran unuan inponon.

Ĉion ĉi havas Esperanto. Kion mi signifas? Pripensu ĝin. Kio estas la unua renkontiĝo kiun oni havas kun Esperanto? Pensu. Denove. Prave! La nomon mem tutsimple. Ĝi estas plaĉanta nomo. Ĝi sonas ambaŭ ekzotika kaj bonveniganta egalmezure. Ĝi aspektas bela kiam presita. Ekrigardu denove:

Esperanto

Bonege. Tio belegas, ĉu ne?

Nun komparu ĝin al la nomo de ĝia samepoka rivalo; *Volapük*. Volaĉpuk! Tio al mi tute aspektas diabla. *Esperanto* pensigas min pri somera tago, trinkante limonadon dum kuŝante surdorse en kampo. *Volapük* ŝajnas al mi tia nomo kiun oni donas al speco de besto kiu siajn proprajn idojn manĝas. Do, ĉu konsentite? La unuaj imponoj gravas.

Plie, fakte, ke Esperanto vere *signifas* ion. "Iu kiu esperas". Kia majesteco! Se iam vi sukcesos trovi iun kiu fakte kapablas *paroli* Volapük (ve, ke mi estas malĝentila! 😞), tiu kontraŭos, ke ankaŭ la nomo de *sia* preferita lingvo internacia havas signifon: "Mondparolo". Tio *ne* malbonas. Eble tio aspektas iom tro militeca por plenplaĉi al mi, sed mi akceptas, ke ĝi taŭgas por kreita dua lingvo apartenante al la tuta homaro.

Ĉiukaze, la kialo pro kio mi verkis tiun *ne* estas subtermeti Volapük aŭ iun ajn alian lingvon. Ne

plaĉus al mi se aliuloj atakus la nian, do tion mi ne faros al la iliaj. Tute ne. Mi promesas.

Ne, kara leganto, tiu artikolo temas pri la kerna elemento de lingvo – la vortoj. Pli precize, favorataj vortoj.

Kiun ligan kun tiuj nekutimaj enkondukaj paragrafoj tio havas? Estas simple. *Esperanto* estas unu el miaj plej favorataj vortoj. Ĝi *aspektas* bela. Ĝi *sonas* melodia. Ĝi havas ĝojan signifon. *Volapük*, laŭ mi, neniun el tiuj atribuaĵoj posedas.

Ĉiukaze, tio estus mallonga artikolo se mi nur citus tiujn du kontribuaĵojn! Do, celante provizi pli longa-tamen-interesindan legverkon, mi komuniĝis kun la JEB komitato kaj petis ilin ĵeti siajn proprajn kontribuaĵojn al mi. Jen tio kion mi ricevis de ili, komencante per la ***favorataj vortoj*** kaj finante per la ***malplaĉantaj***.

La originalan retmesaĝon mi sendis je la 10:05. La unuan respondon mi ricevis je la 10:18 ... de Rolf?! Kia nekutima ĝustatempeco! Jes, veras! Tamen, tio ne miris min; mi nur elsalutis tuj post la sendo de la mesaĝo, manpasis la porteblan komputilon al la postebria kompatindulo kiu sidas je du metroj for de mi, kaj anoncis al li "Korektu vian mesaĝskatolon, filĉjo!"

Sufiĉe amarigita de la doloranta kapo kiun siaj ŝultroj portis, li sendis tre kurtan respondon (kiu tre aspektas kiel respondon kiun oni kredintus, ke mi sendintus): ***krokodili***. "TIO ESTAS STULTA VORTO KIUN ĈEFE UZAS STULTAJ HOMOJ!" Konsentite; mi levos glason je tio.

Tuj poste komenciĝis la torento. Mikeo, kiel atendita pro sia statuto de "S-ro Ĝentila", provizis ***palpo***, kiun rapide sekvis la oferto de Clare, ***fidela***, ĉar "La

unuaj vortoj kiujn mi legis Esperante estis 'Amiko fidela estas trezoro plej bela'; al mi tiuj multe valorigis. Sendube, tiuj estas la plej belaj vortoj en la lingvo kaj *fidela* estas tiu kiu atingas tiun por mi."

Aliaj ofertis vortojn pro ilia aspekto. La favorataj de Daniel estis *grumbli* kaj *kloplodi* ĉar ili "aspektas mozojaj". Li aldonis pliajn: "Kiam mi unue komencis lerni Esperanton, *farti* (memoriganta anglan por *furzi*) kaj *ŝati* (pensigante pri la pasinteca deklinacio de *feki*) multege amuzis min!" Mi opinias, ke Daniel intereso pri la sekvanta:

Eĉ en malgravaj artikoloj tiaj oni trovas lernindaĵeton. Ĉiukaze, ni revenu al la temo.

Bagatelaĵo: Daniel neniel estas la unua kiu rimarkis, ke farti sonas iom konata al oreloj anglaj. Zamenhof mem konstatis, ke la elbuŝigo kaj aŭdo de la vorto embarasis iujn, tiom ke li publikis leteron en la 1907-a eldono de "The British Esperantist": "Ĉar la vorto farti estas tre malagraba por la anglaj oreloj, tial mi konsilas, ke anstataŭ ĝi ni uzadu (precipe en Anglujo) la vorton stati. Ekzemple, "Kiel vi statas?" (anstataŭ "Kiel vi fartas?").

Hannah ankaŭ ensaltis kun kontribuado bazita sur tio, ke vorto "sonas bela": *erinaco*. Nu, tiu afero ja aspektas beleta (eĉ se ĝi manĝas limakojn), kaj *erinaco* ja estas beleta nomo doni al ĝi.



Vortludado ĉeestis kelkajn ofertaĵojn ankaŭ. Amuzis Hannah *neĉesejo*, ĉarma versio de *necesejo*.

Mia propra unua favorata simile bazas sur tio. Plaĉegas al mi, ke eblas anstataŭi la *k* en *diskuto* per *p* por male ŝanĝi la signifon de la vorto. *Diskuto* fariĝas *disputo*. Pro tio, mi citis la neoficialan *dis(k/p)uto*.

Mian duan inspiras la amo de gramatiko en mi; *estonteco*. Mi jam ŝategas la penson ke malgraŭ la problemoj kiujn oni renkontas hodiaŭ, morgaŭ estos alia tago. Mia amo de la vorto augmentas eksponentiale ĉar – kaj mi pardonpetas pro mia malmojozeco – "Plaĉegas al mi la gramatikaj eroj kiuj troviĝas en la konstruo de la vorto (kopulo kiu estas deklinaciita al futura aktiva formo kaj al kiu estas aldonita sufikso por

indiki ion abstraktan) kaj ankaŭ la tuta signifo de ĝi; forgesu tion kio misis hodiaŭ, antaŭĝuu morgaŭon."

Bone, mi revenis al la kutima verkstilo. Nun vi povas vekigi. (Kaj bedaŭri pri mi, sendube. 😊)



La vortojn kiuj ne plaĉis al la komitato oni povas meti en pluraj kategorioj. Unuj, kiel montriĝis ĉe la komenca reakcio de Rolf, venis pro la misuzado de la vorto.

Ekzemple, mi ne ŝatas la vorton *samideano*, kiam oni uzas ĝin kiel sinonimon de *Esperantisto* ĉar mi kredas, ke farante tion forprenas iom de la individueco de homoj. Pluraj kialoj klarigas kial ni komencis lerni Esperanton, kaj ni ĉiuj estas homoj kiuj havas diversajn karakteristikaĵojn kaj kredojn. "Diverseco estas la spico de la vivo."

Simile, Mikeo sciigis kiom li malŝatas *propagandi* kiam temas pri la promocio de Esperanto, pro la negativaj imponoj kiujn ĝi enkapmetas. Eĉ pli frustraciante estas ke alia kaj tut-taŭga vorto *promocii* ekzistas!

Aliaj fontoj de plendado estis, ke iuj vortoj ne sufiĉe precizas por bone montri la nuancojn de vortplenaj lingvoj kiel la angla. Hannah citis *malĝentila* pro tio, ke ĝi gamas de *malpoleta* al *malpolega*.

La finalaj kialoj almenaŭ amuzas. Mi ŝerce tajpis "Mi vetas, ke Petra malamas *translokiĝi* ĉar mi supozas, ke ĝi memorigas ŝin, ke kutime ŝi kurtdaŭre renkontis iun dum internacia evento, kaj tiu rapide decidis ke li amas ŝin kaj anoncis al ŝi ke li baldaŭ alvenos en Anglio por esti kun ŝi!" Ŝi respondis jese, sed aldonis ke "La vortoj *dediĉo* kaj *edzo* ankaŭ troviĝas tre malaltaj ĉe mia listo, ĉefe kiam elbuŝigas ilin certa malino de la Mezlandoj." Mi ne scias, pri kiu ŝi parolis ...

Finalvice, sed neniel la plej malgrave, estas Clare. Ŝi elektis la vorton *maldekstra*. Oni jam povas diskuti pro ĝusteco; kial *dekstra* havu sian propran nomon sed ne *maldekstra*? Tio, tamen, ne estas la kialo pro kio la vorto ne plaĉas al Clare. Diris ŝi: "Mi neniam kapablas memori ĉu *dekstra* signifas *left* aŭ *right* en la angla.

atestos, ke mi havas etan problemon diferencigi *dekstra* ni. Tio estas io kion mi forgesis mencii je la komenco kaj *maldekstra*. (Tim-a redaktaĵo: 'Etan' ne estas la de tiu artikolo; se iam mi provus krei lingvon, mi ĝusta vorto!) Pro tio, la koncepto mem de *maldekstra* volus, ke ĝi permesu multmaniere esprimi kaj montri konfuzegas min ĉar, unue, endas ke mi komprenu ĉu temas emocijon. Kiel estas bone konataj de ĉiuj el ni kiuj havas pri *left* aŭ *right*, tiam mi devas pripensi la malon ... kaj post la plezuron paroli ĝin, tio sendube aplikas al Esperanto, ĉio, necesas decidi pri kiu direkto fakte temas ĉiukaze!" kaj mi esperas, ke mi sukcesis eĉ iomete tion demontri.


Kompatinda Clare. Mi lastatempe kaŝas ion for de Dankonproleginti. Sekomentojn, sugestojn, aŭkontribuojn ŝi. Mi sciigis ŝin ke mi metos etan surprizon en vi havas por estonta versio, sentu libera ĉasi min en la ĵurnaleton por ŝi, sed rifuzis paroli plu. Temas pri la dua de miaj bagatelaĵoj en tiu artikolo:

Do, ĉi tie finiĝas nia eta promenado en la regnon de vortoj. Devus esti granda rekuraĝigo vidi, ke vortoj inspiras malsamajn pasiojn en ĉiuj el

Fakte, alternativavortokiuonirajtasuzianstataŭ *maldekstra* ekzistas. Ĝi troviĝas en la Plena Illustrita Vortaro, do ĝi estas oficiala. La vorto estas *liva*. Ĝi estas tre nekonata (ĉar oni ne instruis komencantojn pri ĝi) sed mi promesas, ke ĝin oni certe uzas. [Sten Johansen](#) trovis 60 okazojn de uzo ĉe la interreto (komparu kun 680 por *maldekstra*).



Tim Owen



Internacia Seminario

Congratulations are due to Rolf Fantom. He played an important role in the organising team of the Internacia Seminario which just took place (very successfully) in Wewelsburg, Germany. Not only are we congratulating him on that success, but also on the fact that the organisers have just elected him to be the chief of the organising team for future years. In this capacity, Rolf will be responsible for a budget of €30.000~! We're already looking forward to this year's IS, which takes place in Würzburg following the theme 'Cultural Identity'.

Available for download at www.novajeb.org.uk and the forums



Elŝutebla de www.novajeb.org.uk kaj la forumoj **Esperanta Versio**

Ĉi tiun eldonon de **S@lution** redaktis kaj produktis **Tim Owen** (meddysong@gmail.com)
 Tre afable kaj profesie kontribuis **Clare Hunter**, **Andrew Weir**, kaj **Daniel White**
 Mi dankas **Daniel** pro sia kuraĝigo kaj helpo per pruvlegado